

LA PACDEFENDANTO

N-o.52-53 NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Apr. -majo 56

NI PROKSIMIĜAS AL LA CELO

Ĝis nun nia organo aperis nur en formo de neregula cirkulero sub la firmao de diversaj kluboj sen iu ajn aprobo de la plej altaj oficialaj instancoj.

La hazardo volis, ke iu malkaŝis tion al la ministerio de kulturo en Praha, kiu tuj sin turnis per letero al la eldonanto, la uzina klubo „TATRA“ en Kopřivnice, postulante klarigon, konstatinte, ke ambaŭ gazetoj: La Pacdefendanto kaj Paco ne estas registritaj kaj ordonis ilian ĉesigon. Kiam la eldoninta klubo al ni sendis kopion de la letero akompanitan de peto de k-dino. Hrčková, kiu tiutempe respondecis por la eldono, ke ni motivigu la eldonadon de niaj cirkuleroj por ke la klubestraro povu doni respondon al la ministerio, ni tiel faris la 30/12 1955 pere de rekta respondo al la ministerio de kulturo. Ni klarigis, ke ĝia informo ne bazas sur fakto, ke oni ĝin informis erare, ĉar neniel temas pri regulaj gazetoj, sed nur pri multobligitaj cirkuleroj, por kies eldonado ne necesas ties speciala aprobo. Samtempe post detalaj klarigoj pri la grava rolo, kiun niaj cirkuleroj plenumas por la internacia pacmovado, ni postulis eldonpermeson por presitaj gazetoj „La Pacdefendanto“ kaj „Paco“ kaj akcentis, ke ambaŭ cirkuleroj pluen aperos en ĝisnuna formo ĝis la definitiva solvo de nia petskribo.

La 4an de januaro 1956 jam venis respondo kun aldonita formularo, laŭ kiu ni petu la eldon-permeson.

Prikonsiderinte ĉiujn kalumniaĵojn, kiujn ĝis nun estis publikigitaj kontraŭ Esperanto, kaj da tiuj ne estis malmultaj, necesis ellabori vere efikan petskribon kaj akompani ĝin ankoraŭ kun referencoj de eminentaj esperantistaj pacdefendantoj.

En tiu direkto ni atingis veran rekordon. Ni tuj petis diversajn eminentulojn el nia movado, havigi al ni siajn referencojn en formo de „rekomend-leteroj“ por nia ministerio. Ekspres-leteroj per aviadiloj estis senditaj ankoraŭ la saman tagon al ĉiuj, al ni konataj eminentaj personoj en la tutan mondon.

En tempo de nur 15 tagoj kolektiĝis ĉe ni pli ol 30 „rekomend-leteroj“ el 20 landoj kaj ĉiuj kontinentoj. Estis jenaj kamaradoj, kiuj brave kaj ĝustatempe plenumis sian esperantistan devon:

Prof. Teodor ARBERGS, pedagogo en RIGA, Latvia, S. S. R.

Prof. d-ro. Gurgen SEVAK, en EREVAN Armenia S. S. R.

E. DIN, majstro en tekstilejo de WUSIH, Ĉinio.

LIU Zyn, instruisto en MUKDEN, Ĉina Popola Respubliko.

Prof. Canke MURGIN, SOFIO, Bulgario

Prof. ing. Josef Kochman, en PRAHA, Ĉeĥoslovakio.

Prof. d-ro. Josef KONDOR el VASVÁR, Hungario

Prof. Mieczyslaw SIGNARSKI, lektoro de Jagel. Univers. en KRAKOW, Polio.

REGIONA PACKOMITATO en NEURUPPIN Germana Dem. Respubliko/k-do.

Schödl

Pál BALKÁNYI, MEM-peranto, BUDAPEST

George GABOR, MEM-peranto, NEW YORK

Karl KVIST, MEM-sekr. DEJE, Svedio.

Arnaldo OPISSO, MEM-peranto,, Italio

LABORISTA ESP-KLUBO, MALMÖ, Svedio.
K. V. AHLBERG, vicprez. De MEM, Svedio.
D-ro. Adolf HALBEDL, KNITTELFELD.

UEA-delegito por Aŭstrio

Gustav NILSSON, Dipl.ing.de ĥemio en VYGBYHOLM, Svedio

Niilo KAVENIU, red.de popola ĵurnalo „Ŭusi Päivä“ en TURKU, Finnlando

Tada TOMEĴI, estinta 13 jarojn en malliberejo, nuns memoro de la reg.komitato de
Japana Kom.Partio en OSAKA, Japanio.

Masao MIJAMOTO, sekr.de „KLEG“ OSAKA.

Saldanha CARREIRA, poeto, LISABONO, en Portugalio.

Steve BENNETT, MEM-peranto, Aŭstral.

ESPERANTISTA PACRONDO en STOKHOLM

Alfred MACEK, pastro en MIKULOV – ĈSR

Nguyen Van KINH, deputito kaj membro de la Centra Komitato de la Laboranta Partio
en HANOI, Vietnamo.

Jao-anh-KHA, verkisto – ĵurnalisto en HANOI, Vietnamo.

Avetik ISAHAKJAN, la plejgranda poeto kaj verkisto de Sovjet-Armenio

Simon MKRTIĈJAN, pedagogo-ĵurnalisto en EREVAN, Sovjet-Armenio

Jean DALET, prez.de Franca Esp-pac-komitato, ASNIERS, Francio.

Kun malfruiĝo ankoraŭ atingis nin kelkaj rek.leteroj, inter ili de prof. S.

PODKAMINER – LENINGRAD, el Islando kaj aliaj.

Ĉiuj, tiuj „rekomend-leteroj“ venis ekspres-rekomendite per aerpoŝto en kovertoj, bele alfrankitaj per abundaj poŝtmarkoj, glumarkoj ktp. Ili ĉiuj estis senditaj akompaninte kun ĉeĥa traduko kaj nia petskribo al la ministerio por kulturo. La tuta fasko pezis pli ol 500 gramojn kaj la materialo plena sufiĉus por aranĝi etan ekspozicion.

La sendintoj el ĉi tie akceptu nian plej sinceran dankon, ĉar ilia referenco certe profunde impresis al la respondeculoj en nia ministerio kaj ni ne dubas, ke ili grave kontribuos al por ni favora decido, rilate eldonpermeson por presitaj gazetoj „La Pacdefendanto“ kaj „Paco“.

Jam fondiĝis kaj estis anoncita la ministerio Redakcia rondo konsistanta el jenaj kamaradoj:

Rudolf BURDA, respondeca gvidanto

Josef REISER, gvid. de administr.

Alfred MACEK, pastro, kiel reprez. de Distrikta Packomitato en Mikulov, kiu funkcios kiel eldonanto.

JUDr. Vladimír MOHAPL el Olomouc por juristaj demandoj.

Dušan KOSTOLNÝ el Prakovce (Slov.) reprezentos la junulaj-fakon.

Václav ŠPUR, el Doksy u Mách.Jez. por la lingvaj demandoj.

Krom la supre nomitaj ankoraŭ la skribintoj de „rekom.leteroj“ kaj aliaj estis anoncitaj kiel konstanta kunlaborantoj de nia redakcio, kiuj ĝin provizos laŭ ebleco per interesaj raportoj el la tuta mondo. Por ambaŭ gazetoj ni petis eldonkvanton po 5.000 ekz-oj provizore. Tiun ĉi kvanton ni povos plialtigi, se kreskos la abonantaro.

Necesas nun, ke ĉiu ĉeĥoslovaka esp-isto fariĝu abonanto de nia gazeto, kiu fariĝos centra organo de ĉeĥoslovakaj Esperantistaj Pacdefendantoj. Abonigu ĝin ankaŭ por viaj eksterlandaj amikoj, kiuj certe volonte rekompencos vin per alia samvalora literaturo.

Ĝis nun ni ricevis jenan respondon de la ministerio:

MINISTERIO POR KULTURO

Praha, la 6. de aprilo 1956

N-o.: Zn.2700/131-SV5-6-4-56

Esperanto gazetoj – petskribo rilate eldonpermeson

Rekomendite

Al k-do. Rudolf B u r d a
PLZEŇ, Palackého nám.6.

Estimata kamarado,

al via skribita kaj telefona urĝigo ni sciigas, ke Via petskribo rilate permeson de ambaŭ esperantaj gazetoj, estas pro sia graveco pritraktata de la koncernaj interesataj instancoj.

Tuj, kiam tiu ĉi procedo finiĝos, ni rapidigite informos vin pri la rezulto.

Kun kamaradaj salutoj

Gvidanto de la fako por periodaj presaĵoj
D-ro.J.Hartman (propramane)

- 3-

Ĉar nia petskribo jam estis sendita en komenco de februaro kaj ĝis nun ne venis respondo rifuza, ni firme kredas, ke ne estos ĉe la interesataj instancoj kontraŭdiroj kaj tial ni ĉiutage jam atendas por ni favoran decidon.

La tuta afero povus esti jam glate solvita, se ne estus interveninta la klubo en Praha, kiu post nia petskribo ankaŭ petis renovigon de la likvidita EAĈSR kaj ĝiaj organoj. Ni tamen esperas, ke tiu problemo solviĝos ambaŭflanke kontentige.

Rud.BURDA

GRANDA TAGO EN LENINGRADO

Ĝojigita mi informas vin pri sendube signifa sukceso de nia laboro en Leningrad. Antaŭhieraŭ (la 13/4.) havis leningradaj esperantistaj pacdefendantoj vere grandan tagon. En la centra prelegejo de Tutunia Asocio por disvastigo de politikaj kaj sciencaj scioj estis prelego de prof. Bokarev (el Moskvo) “NUNTEMPA STATO DE LA DEMANDO PRI LA INTERNACIA LINGVO (ESPERANTO)“. Antaŭtage la ĉefa leningrada ĵurnalo „LENINGRADSKAJA PRAVDA“ (Leningrada Vero) publikis anoncon pri tiu prelego. Dum tri tagoj la anoncon oni ankaŭ disaŭdigadis pere de la Leningrada radio. La salonego estis plenplena kaj amaso da homoj vane atendis en vestiblo nericevinte jam biletojn. La intereso pri la prelego estis grandega. La lektoro ricevis preskaŭ monoplanon da skribitaj demandoj. Tiu ĉi okazintaĵo havos grandajn sekvojn kaj tre verŝajne ne nur en nia urbo.

K-do. Podkaminer promesis sendi al vi apartan raporton pri la prelego de prof. Bokarev por la „Paco“.

Ni skribis okaze de la 1.majo salutleteron al esperantistaj pacdefendantoj. Kun nia aktiva k-do. Majzel mi vizitis niajn gvidantajn instancojn por ricevi permeson ĉi leteron pretigi en presejo. Ĉar ni nenie renkontiĝis kun kontraŭdiroj la letero, jam estas presata kaj se ne ankoraŭ neantaŭvideblaj baroj malhelpos, ĝi estos baldaŭ dissendata. Ni ankaŭ intencas dissendi informan leteron al ĉiuj sovjetaj esp-istoj-abonantoj de „PACO“.

Dank` al la tre sukcesaj agoj de k-do. Podkaminer ni jam havas la unuan tute oficialan Esperanto-sekcion en la Domo de Kulturo de la Industri-produktiva Kooperativo en

LENINGRAD. Estus tre dezirinda por ke eksterlandaj kaj sovjetaj gek-doj aktive helpu el tiu ĉi sekcio. La helpo povus esti, leteroj kun peto rakonti pri la laboro de la sekcio, interŝanĝo ekspozicia materialo, materialo uzebla por instrui-produktiva kooperativo / pri teknikaj demandoj ktp.

Ni ricevis sciigon de moskvaj kamaradoj, ke la centraj gvidantaj organizoj donis jam konsenton por krei Asocion de sovjetaj esperantistoj (centran).

„La glacio rompiĝas“

Mi deziras al ĉiuj esperantistaj pacamikoj grandajn sukcesojn!

B.TOLL
ĉefperanto de M.E.M.
Lesnoj pr.20 kv. 98, LENINGRAD-175

ESPERANTO EN ĈEĤOSL. ALTLERNEJO

Dank` al nia fervora kamarado, faka instruisto Vratislav Kučera, ni sukcesis aranĝi Esperanto-kurson en la Maŝinkonstrua kaj Elektroteknika Altlernejo de Plzeň.

La instruado estas libervola, ĝis nun aliĝis 15 gestudentoj, kiuj kun entuziasmo lernas sub gvido de lektoro d-ro. Josef ČERNÝ. La rektoro de tiu ĉi altlernejo k-do. ing. Volejník tre afable helpis efektiviĝi tiun ĉi projekton. Post longaj jaroj ni do povas konstanti, ke estas en nia urbo Plzeň la unua altlernejo, en kiu oni denove instruas kun oficiala aprobo de la rektoro Esperanton en Ĉeĥoslovakio.

En proksima tempo malfermiĝos ankaŭ Esp-kurso en la kuracista Fakulto, filio de Karola Universitato en Plzeň. Ni esperas, ke baldaŭ sekvos tiun ekzemplon ankaŭ aliaj altlernejoj en ceteraj urboj de Ĉeĥoslovakio.

Raporto de la red.

GRAVA HISTORIA DOKUMENTO

Estas la jarkolekto de „LA PACDEFENDANTO-1955“. En ĝi respeguliĝas historie gravaj okazintaĵoj de nia movado en Popoldemokratioj k. Sovjet-Unio. La volumo ampleksas 104 paĝojn. Aĉetebla por 12.-Kč aŭ 16 int.resp.kuponoj ĉe k-do. R. BURDA, Palackého 6, PLZEŇ, ĈSSR.

EL LA EKSTRA KUNVENO DE LA MONDA PACKONSILANTARO.

Denove kunvenis la Mondpackonsilantaro en Stokholmo, en urbo, kiu multfoje antaŭe jam estis la loko, kie la Packonsilantaro rekontiĝis por fari gravajn decidojn, kiuj efike kontribuis al la paco.

Tiel estis ankaŭ dum la lasta kunveno komence de aprilo, en kiu eminentaj pacbatalantoj el la tuta mondo konferencis kaj pritraktis la plej gravajn demandojn rilate la mondpacon.

Specialaj deklaroj estis aprobitaj de la komisionoj por atomforto, por ekonomiaj, kulturaj kaj socialaj demandoj kaj krom tio la organiza komitato sendis rekomendon kun jena teksto al la naciaj pacmovadoj ...

- 1./ Antaŭ ĉio la grandpotencoj devas etape kaj kontrolite pli malgrandigi siajn armigojn. Tielmaniere plifaciliĝos la intertraktadoj pri mondkonvencio por malarmigo.
- 2./ La armilkomerco devas esti sub kontrolo de Unuiĝintaj Nacioj.
- 3./ Atom- kaj hidrogen-eksperimentoj devas ĉesi.
- 4./ La popoloj havas rajton postuli de siaj registaroj konkretajn agojn por malarmigado.

5./ Hodiaŭ estas necese pli ol iam ke ĉiuj pacamaj fortoj, movadoj kaj organizoj unuiĝu por komuna agado.

Por povi plenumi la lastan punkton, la konsilantaro proponis krei kontaktkomitaton.

Ĉiu pacamanta esperantisto komprenas la gravecon en ĉiu supre cititaj punktoj kaj ties signifon por ankoraŭ plilarĝigi la tutmondan pactendaron. Precipe la lasta punkto malfermas novajn, gigantajn perspektivojn kiam temas pri plivastigo de jam nun forta pactendaro. Tiu punkto ankaŭ atentigas nin MEM-anojn pri niaj estontaj taskoj.

Ĉis nun restis preskaŭ nur sur la papero niaj statutoj, rilate la intiman kunlaboron en la Mondpackonsilantaro kaj en la naciaj packomitatoj. Ĉu tiu cirkonstanco dependas de MEM aŭ de la Mondpackonsilantaro? Mi kredas, ke ĝi dependas de ambaŭ partoj. Dependas de ni, ĉar ni pro troa okupiteco kun organizaj aferoj en la komenco de nia movado ne havis sufiĉan tempon por dediĉi sin al efika kunlaboro kun la Packonsilantaro, kaj dependas de la Packonsilantaro, almenaŭ de diversaj landaj packomitatoj, kiuj ĝis nun ignoris nian laboron, ne sufiĉe komprenante la valoron kaj utilecon de nia esperantista porpaca agado.

Tamen, post la granda packongreso en Helsinki kaj post la esperantista renkontiĝo en Varsovio dum la Junulara Festivalo, kie ni aktive partoprenis, montriĝis pli granda intereso por nia movado.

Sed ĝis nun ni ne povis plene montri la gravan rolon, kiun povas ludi Esperanto en la Monda Pacmovado. Por ke ni tiel povu fari, ni devas havi eblecon labori en la kadro de ĉiuj packomitatoj, fondi tie Esp-studrondojn, organizi kontaktojn inter la homoj de diversaj landoj, reciprok. interŝanĝojn de esp-istoj dum la ferioj kaj libertempoj kaj atingi, ke Esperanto estu akceptita ankaŭ kiel oficiala lingvo por la kunvenoj kaj kongresoj de la Mondpacmovado.

Kiel jam ĉi supre dirite, malfermiĝas nun novaj eblecoj al kunlaboro ankaŭ por M.E.M. Okaze de tio devas esti la plej grava tasko de ĉiuj MEM-sekcioj tuj kontakti kun la landaj packomitatoj por starigi firman kaj vigla kunlaboron. Nia MEM, kiu plena staras sur la fundamento de la Mondpacmovado, devas ricevi la plej grandajn eblecojn por povi sukcesplene kontribui por sia kunlaboro en la batalo kontraŭ la atom-armiloj kaj por la sekurigo de la mondpaĉo.

Karl KVIST – Svedio

EL NIA REDAKCIO

Niaj abonantoj bonvolu pardoni la malfruiĝon de tiu ĉi numero. La kaŭzo estas en tio, ke ni devis eldoni 24paĝan „PACO“n por aprilo-majo kaj kun plejbona volo ni jam ne sufiĉis krom tio ankoraŭ eldoni L.P.-on. Ankaŭ al ni malhelpis manko de papero, kiun poste dank` al k-do.F.Lička ni ricevis el Ostrava kaj fine eĉ manko de mono, ĉar multaj ankoraŭ ne paĝis sian jarabonon.

KURAGĜE AL LA CELO

Ant. CHRÁPAVÝ, OSTRAVA

Mi ne opinias, ke al celo
iros ni tra neĝ` de Himalajo,
nin allogas pli ol frida kelo,
dolĉa ammielo , flugo de abelo,
varmo de pritempo, bonodor de majo,
fruktoj de ĉerizarbaj de juni, julio,
floroj de tilio, la muzik-ario,
larmoj ne kaj ploro, sed la pac` de Dio.

Al la pac` oceli estas devo
tiel urĝa de la homarano,
ke ĝin tuj plenumi kun plezur` kaj verovo
kun streĉ` de nervo, eĉ kun korkrevo
estas la honoro por feliĉ` kaj sano.---
Nerve sin tremantaj homoj kiel kano,
orfoj sen la patroj, multaj sen la pano
en milit` estintaj, avo, onklo, nevo,

homoj senokulaj, sen piedo, mano,
viroj kripligitaj de milit-satano,
urboj kaj vilaĝoj kiel ruinaĵoj,
per sangskribitaj la leteraj paĝoj,
vokas al scienco, al mondkonscienco
kaj al la Judasoj kun monaviceco:
ĉesu eltrovi, fari militilojn !
La homar` meritas havi sanajn filojn!“

IMPROVIZAĴO

Orig.de VIJAMOTO Masao, OSAKA

Nu marŝu, filoj zamenhotaj,
ĉar baldaŭ venos nova tag`!
Jam sufiĉas sonĝoj malnovaj:
vin preparu por la glortag`!
Malamikoj, fi, de mondpac`
homaron puŝas al perevo:
Hidrobomb` kaj atombomb`
eksplodas brue kun minac`.
Al vic`, sub verda flag`!
En vic` de paca front`!
Batal`, batal`!
Por brila tag`,
Kun ni por la estont`!

La botoj premas la patrion,
de l' alilanda soldatar`.
Kaj forvendi volas nacion
la hundaĉoj por fi dolar`.
Nun indigne bolas` eĉ mar`
kaj montoj krias el hontŝlimo
Ĉu povus ni silenti nur ,
nur ni, la esperantistar`?
(Rekantaĵo)

Ho, ne forgesu la inferon
de Nagasaki kaj Hiroŝim`!
Veoj plenis tutan la teron
kaj ankoraŭ sangas ruin`.
Nu, fenikse staru jam kun kant`
por savi mondon, l' idealon!
Jen flugas de Pikas kolomb`
ke vivu Pac kun Esperant`.
(Rekantaĵo)

(Kantebla laŭ la Marseljezo) Kopiita el jap.gaz. „LA MOVADO“.

ĈEĤOSLOVAKA PARLAMENTARO POR ESP-O.

Dimanĉe la 15an de aprilo 1956 distrikta Packomitato en Opava aranĝis publikan kunvenon en kiu havis la ĉefreferanton parlamentaro Antonín FIALA. Jam antaŭ kunveno en kiu havis la ĉefreferaton parlamentano Antonín FIALA. Jam antaŭ la kunveno mi intervenis, kaj informis lin pri la malfacilaĵoj, kiujn ni havas kiel esperantistaj pacdefendantoj, precipe rilate la planitan konferencon de popoldemokrataj esperantistoj en Bratislava.

Post lia interesa referato mi tralegis proklamon okaze de la „Internaciaj Memortagoj de la batalo kontraŭ la faŝismo kaj poste kiel diskutita kontribuajon mi prelegis pri la efiko de Atom-kaj hidrogenbomboj. Mia prelego tiel interesigis k-don. A.Fiala, ke li elpetis nian adreson kaj promesis interveni en tiu afero ĉe la Centra Komitato de Ĉeĥoslovakaj Pacdefendantoj en Praha.

Fakte, post nelonge mi ricevis de li leteron kun sekvonta enhavo: “
VICEPREZIDANTO DE LA NACIA PARLAMENTO, Antonín FIALA – OSTRAVA
22.4.1956
Estimata amiko.

La esperantistan demandon kaj ilian envicigon en la pacmovadon en tutŝtata kaj internacia kadro mi pritraktis kun la centra sekretario da la Ĉeĥoslovaka Komitato de Pacdefendanto, en Praha II. Panská ul.ĉ.7, kaj petis ŝin, ke pritraktu tiun ĉi gravan demandon kun la koncerna faktoroj. Ŝi komprenis, ke fakte ĉi tie temas pri neeluzita okazo kaj promesis tion baldaŭ pritrakti k-dino Marie Matějková kvankam ŝi unue opiniis, ke la esperantistoj povas elvivi en la kadro de uzinaj kluboj, tamen fine aprobis, ke ĉi tie mankas la centra dirigado por alia agado, kiu povus grave kontribui al pli vasta disvolviĝo de internaciaj rilatoj.

Mi estas konvinkita, ke tiu ĉi demando baldaŭ solviĝos kaj se tiel ne okazos, mi ree memorigos ĝin. Dume daŭrigu en via bona laboro ankaŭ la Distrikta Packomitato, ĝis kiam la afero disvolviĝos en pli larĝa, tutŝtata skalo.

Tutkore vin salutas , via Ant.FIALA“

Se la gek-doj, legantoj de „L.P.“ povus al mi disponigi argumentan materialon pri servoj de Esperanto al la pacmovado, mi povus ĝin montri al la vicprez. de deputitaro.

Antonín FRANTL
Veleslavínova 23, OPAVA, Ĉeĥosl.

LERNI ESPERANTON ?

En la centra organo de la Ligo de Ĉeĥoslovaka Junularo „MLADÁ FRONTA“ de 1. aprilo aperis potdiversflankaj demandoj pri Esperanto jena respondo:

Niaj legantoj Eugen Hanisko el Volary, Oldřich Schweter el Havířov, V. Huk el Zbuz, Pavel Tichý el Svitavy, Milan Mrňak el Kánina kaj Jaroslav Doležal el Holešov demandas nin, kiam ekestis Esperanto, kiu estas yia kreinto, kaj kiajn yi havas perspektivojn kiel internacia lingvo por estonto.

Ni ne konsideras Esperanton kiel internacian helplingvon. Jam en j. 1910 ekzistis amaso da tiaj „heplingvoj“ el kiuj multaj rapide malaperis kaj kelkaj ekzistas ankoraŭ hodiaŭ. Esperanto estas plejdisvastigita kaj enradikiĝis ankaŭ ĉe ni.

Ĝin kreis varsovia okulkuracisto Ludoviko Zamenhof kaj publikigis ĝin en la jaro 1887. Ĝia kompare kun kiu ajn lingvo ĉefe plisimpla gramatiko (Esperanto havas entute 16 gramatikajn regulojn) ankaŭ tio, ke ĝi konsistas el vortradikoj de diversaj lingvoj – plejofte ankaŭ el tiu, kiun la inter, ke esitoj pri Esperanto parolas – ĉio ĉi logis multajn homojn, kiujn volis interkompreniĝi aŭ korespondadi kun alinaciuloj. Estis kreita internacia esperantista organizo kun la tasko peri kontakton inter esperantistoj de diversaj landoj kaj zorgi pri ĝia plua evoluo (la organiza centro estas kancelario de UEA en Londono). La Esperanta vortprovizo fakte dum ne tutaj 70 jaroj de ĝia ekzisto kreskis. Kaŭze de tio naskiĝis – ĉefe inter la esp-istoj mem – la erara opinio, ke Esperanto povas anstataŭigi ĉiun ajn nacian lingvon en la mondo.

Ĉiu nacia lingvo riĉigas sian vortprovizon senpere el tio kiel naskiĝas novaj perceptoj en la scio, kiuj respogas la ekonomian kaj kulturen evoluon de certa nacio. Neniu monda helplingvo sufiĉas akcepti tiuj ĉi novajn perceptojn de ĉiuj popoloj.

La nacia lingvo kreiĝas el la psiko, pensado de la popolo kaj kapablas percepti (akcepti) eĉ la plejdelikatajn nuancojn de la pensado. Esperanto kiel sennacia lingvo ne kapablas tion. Ĝi devas kelkajn perceptojn aŭ vortligojn simpligi kaj tiel ankaŭ malriĉigi.

La bonaj klopodoj de homoj, interkompreniĝis kun anoj de aliaj popoloj, havas kompreneble, kaj ĵus hodiaŭ, en la epoko kiam malaltiĝas la internacia streĉiteco, grandan signifon, al kiu povas kontribui eĉ Esperanto. Sed tiuj ĉi klopodoj estos multe pli efikaj, se ni lernos ian mondan lingvon – la rusan, anglan, germanan aŭ francan. Pere de tiuj ĉi lingvoj ni ankaŭ interkompreniĝos preskaŭ en la tuta mondo kaj ni kapablos interkonatiĝi eĉ kun la riĉa literaturo de kelkaj el tiuj nacioj, legi ilian gazetaron k.t.p., kion Esperanto al ni ne ebligas.

Rudolf H O N S

Nu, gekamaradoj, mi kredas, ke tiu ĉi artikolo ne ĉagrenigos vin, sed malo, vi elkore ridos. La gazeto „MLADÁ FRONTA“ mem ne estas kontraŭ Esp-o., sed ĝi nur akceptis tiun ĉi naivan argumentadon de la erare informita k-do. Hons. Aliel ni povas konstanti ĵus tiu gazeto jam depost kelka tempo publikas sufiĉe favorajn sciigojn pri Esperanto.

Estus dezirinde, ke niaj legantoj (ankaŭ la eksterlandaj kaj precipe sovjetaj) respondu ĝentile al la redakcio rilate tiun artikolon kaj petu publikigon de viaj respondoj. Eksterlandanoj povas skribi Esp-lingve. Oni certe trovos tradukiston. Adreso: Redakce „MLADÁ FRONTA“, Ĉeĥoslovakio

Se eble, informu ankaŭ nian red. per alsendo de kopio.

AMIKOJ RETROVAS UNU LA ALIAN

En miaj manoj troviĝas kajero versaĵoj, kiujn verkis germana k-do. dum la jaroj 1923-1932 (li tiam loĝis en Schweidnitz, Silezio) „Gedichte eines Arbeiters“ (Poemoj de laboristo) – tiuj vortoj estis manskribis da la k-do, sur la titolpaĝo. Multaj versaĵoj estis germanlingvaj, aliaj en Esperanto.

La 1.de marto 1933 la aŭtoro de la versaĵoj ekskribis per krajono sur la lasta paĝo: „K.k.! Akceptu la poemoj, ĉar en Germanio la policio volas „likvidi ilin“ kaj sendis la kajeron al redakcio de Sebastopol (Krimeo).

Mi neniam interrilatis kun la aŭtoro de „Gedichte eines Arbeiters“ nek persone nek letere, tamen en la redakcio transdonis la kajeron al mi. Malgraŭ la malfacilaĵoj dum la militperiodo mi feliĉe sukcesis konservi ĝin. La kolekto de la versaĵoj apartenas al la aŭtoro, sed ĉu li estas vivanta kaj, se jes, kie li loĝas nuntempe?

Mi turnis min al k-do. Max Schade (STREHLA-DDR). Li esploris la aferon kaj baldaŭ komunikis al mi la adreson de la poeto, kiu nun loĝas en Bavario (DBR). Kompreneble kun malpacienco mi jam atendas respondon je mia letero de la aŭtoro.

+ + +

Jen estas alia ĝoja fakto: Ĝis 1933 mi dum dek jaroj amike rilatis kun germana es-isto Th., kiu loĝis en Hamburg.

Faŝista diktaturo en Germanio k. la milito, ĉion interrompis. Antaŭ 4 monatoj mi komencis serĉi mian germanan amikon, kiun mi elkore ŝatis.

Ree mi petis k-don Schade, kiu al mi promesis helpon, kvankam li mem serioze dubis pri sukceso. Li skribis: „Mi timas, ke k-do.Th.pereis kiel viktimo de fiaŝista barbareco“. Sed malgraŭ tio mi baldaŭ pere de li ricevis la adreson.

Kaj jen mi venas la leteron de mia kara amiko kaj legas en ĝi: „Dum la tuta tempo de la teruro kaj teroro ni konservis, kiel vi certe supozas, niajn pacamajn sentoj kaj pensojn, ili estis la direktivoj por nia sintenado dum tiu tempo. Ni kompreneble pro tio devis multe suferi kaj toleri, same kiel multaj aliaj sampensantoj en nia lando“. Li skribis ankaŭ: „mi kredas, ke la nova ekfloriĝo de Esperanto en Sovjetio donos gravan kaj fortan impulson al nia movado en la tuta mondo, ne laste ankaŭ por la evoluo de socialismo en tutmonda skalo.

Ĉiu tago alportas novajn kajn novajn faktojn. Ili klare montras la praktikan rolon de la helplingvo Esperanto kaj ĝian grandan signifon por la mondkulturo kaj progreso.

Koran dankon al k-do Schade rimarkinda solidareco k. helpemeco!

A.K.SAVOSTIANOV
MOSKVA, Poŝtkesto 466, Glavni poĉtamt

OPINIO EL RUMANIO

En la organo „PACO“ mi legis traŝan artikolon sub titolo „En Rumanio la Centro ne funkcias“. Domaĝe ĝi ne funkcias spite la ricevitaj bonaj sciigoj el Sovjet-Unio kaj Popoldemokratioj. Sed mi esperas, ke tiuj bonaj sukcesoj fine tamen instigos niajn ĉefurbajn gek-dojn al pozitiva aktiveco.....

Ni esperantistaj aktivuloj en Rumana Popola Respubliko estas konvinkitaj, ke ne sole la bravaj sovjetaj gekamaradoj, sed pli frue la kuraĝa instigado da la ĉeĥoslovakaj samideanoj ebligis, ke la nuna pli favora situacio disvolviĝis. Sekvi ni esprimas al ambaŭ pioniraj flankoj nian profundan dankon por la modela kunlaboro! Ni tutkore dankas por ricevitaj „Pacdefendantoj“, kaj esperas ilin ricevi regule.

Vineze Edmond
Calea Republicei 12.II.10
ORADEA, Rumanio

JAM MOVIĜAS LA RUMANA CENTRO

Nia redakcio ĵus ricevis kun la dato de 28.aprilo, jenan leteron el Bukureŝto (la rum.ĉefurbo):

„Konante la fakton, ke nunjare la ĉeĥosl.esp-istaro prepares la 2an Esp-istan Danubvalan Konferencon en Bratislava, ni sciigas al vi, ke la rumana esp-movado komencis apenaŭ kunigi siajn vicojn k. la bukareŝta grupeto de estintaj gvidantoj de la movado (subskribitaj) penadas por restarigi landan asocion. Ni ĝustatempe informos vin pri la rezultoj de nia laboro.

Nu temas pri tio, ricevi informojn, ĉu eblas, ke ni ankaŭ partoprenu la menciitan konferencon.

I.Petrin, S.Zalmanoviei, I.Bunesku, Korespondadreso: k-do.St.FREAMÁT, Str.Gabriel Péri 4, BUKAREŝTI-22.

Resp.de la red.la Danubvala konferenco ne okazos en Bratislava,ĉar la aranĝantoj ankoraŭ nun ne ricevis oficialan permeson. Oni dire estas projektita ties aranĝo en Varsovio, sed detalajn informojn ni ĝis nun ne ricevis. Mi deziras al niaj bukareŝtaj k-doj, ke ili baldaŭ sukcesu restarigi la Esperanto-movadon kaj en tiu senco necesas ke ĉiuj rumanaj gek-doj ligu kontakton kun sia centro kaj helpu al ĝiaj klopodoj.

NOVAĴOJ EL SOVJETIO

En Latva gazeto „Sovjet Instruistoj“ aperis la 21/3.granda artikolo kun titolo „ESPERANTO“. En Armena gazeto „KOMUNISTO“ No.73 de 27/3.same aperis propaganda artikolo pri Esperanto.

En la redakcio de „Granda Sovjeta Enciklopedio“ d-ro.de filologiaj sciencoj E.A.Bokarev prelegis pri Esperanto por la geoficistoj de la redakcio.

En Instituto de Scienca Informado en Moskvo fondiĝis Esp-rondeto, kiun gvidas k-dino E.A.Dolgiĥ.

S.SARIĈEV-Moskvo

LA LIGO DE ĈEĤOSL.INVALIDOJ

en letero de 3.aprilo esprimas al nia redakcio sian dankon por la publicita artikolo rilate la blindulan Esp-gazeton „AŬRORO“ kaj diras: „...tiu ĉi publikigo en via organo renkontiĝis

kun eksterordinara sukceso. Ĝi kontantigis nin kun novaj amikoj, precipe el Sovjetio kaj popoldemokrataj landoj. En tiuj tagoj ni estis ĝojigitaj, leginte la saman alvokon ankaŭ en la gaz.PACO (itala eldono). Certe ni ĝuste difinas konstantante en tio vian meriton kaj pro tio mi dankas por tiu ĉi kun laboro.

Sukceson al la paco!

Vuk ECHTNER

Ferd.WILDMANN
direktoro.“

EL LA LATVIA S.S.R.kaj

Ĉe k-do.Arvedo VĚTRO jam estis du kunvenoj de geesperantistoj el Riga, la 18an kaj 31an de marto. La humoro estis entusiasma kaj agemo ŝvelis en ĉien brustoj.

Nia unua tasko nun estas serĉi la ankoraŭ kaŝitaj esp-istojn. Ĝis nun mi jam trovis 20 personojn.

La intereso pri Esp-to inter la studentoj de la universitato Pedagogia Instituto estas granda, sed ankoraŭ kontraŭstaras profesoroj kaj instruistoj. La aktiveco de la studentoj estas kuraĝiga k. multpromesa. En la urbo Liepaja profesoro I.Loja instruas Esp-on la ĉ.40 gestudentoj. La ĉefa malfacilo montriĝas en manko de lernolibroj, sed malgraŭ tio ne haltas. Mi esperas, ke baldaŭ ankaŭ funkcias kurso en la tramista rondo de Riga.

Teodors ARBERGS-Riga

KOMPARTIA KONGRESO APROBAS NIAN AGADON

En la finrezolucio de la 20a kongreso de la Ĉeĥosl.Komunista Partio ni povas legi jenan proklamon: „En la intereso de la batalo por la paco kaj en la intereso de la laboristaro, ni prezentas nian manon por ligi kunlaboron, al socialistaj kaj progresemaj rondoj en kapitalistaj landoj; ni disvolvos ankoraŭ pli grandan klopodon, por ke disvastiĝu niaj internaciaj rilatoj ankaŭ je la linio de sociaj organizoj kaj kulturaj institutoj.“

Jen, kion nun la partia kongreso proponas, tion ni, esperantistaj pacdefendantoj jam delonge praktike faras, ĉar ni konsciiĝis ke ĉefe tia agado povas sekurigi pacan kunvivon al la popoloj kaj samtempe sukcesplenan disvastiĝon de nia internacia lingvo. Sekve ĉiuj esperantistoj, kiuj uzas la lingvon por ligi kontaktojn inter kulturaj institutoj kaj sociaj organizoj de diversaj nacioj, laboras kaj grave kontribuas al la plenumo de la rezolucio de la 20.partia kongreso kaj neniu rajtas en nia lando al ili malhelpi.

J.Reiser

MINISTRO MOLOTOV KAJ ESPERANTO

Niaj legantoj bonvolu pardoni. La raporto, ke min.Molotov uzis Esperanton en telegramo adresita al la japana popola konsilantaro bazas je miskompreno. Laŭ „Heroldo de Esperanto“ japanaj oficistoj opiniis, ke la angla lingvo estas Esperanto. Oni devas nian redakcion senkulpigi, ĉar ni ja nur transprenis oficialan raporton el angla gazeto. Tiel ankaŭ okazis, ke jam multaj diverslandaj gek-doj per leteroj esprimis al k-do.Molotov sian simpatian.

Tio tamen ne domaĝas, ĉar frue aŭ pli malfrue la fantazio fariĝos certe realaĵo.

Pli ridinda estas tio, ke Japanoj, kiuj jam de post jaroj vivas apud la angle parolanta usona armeo ankoraŭ ne kapablas distingi la anglan lingvon de Esperanto kaj tiel frenezigas la tutan mondon per fantazia senzacio.

SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO

en Doksy u Máchova Jezera aranĝas de la 15-28.de julio denove siajn jam tradiciajn kaj fame konatajn somerajn kursojn per komencantoj, progresintoj kaj diversajn fakprelegojn por eduki instruistojn kaj kapablajn propagandistojn de Esperanto. La instruado estos kompletigota per diversaj kulturaj kaj amuzaj aranĝoj kaj gvidata de perfektaj fakuloj. Jam pli ol 1.500 interesuloj trapasis tiujn kolegiajn kursojn.

Ankaŭ nunjare kunvenos en la bela regiono de Doksy apud granda lago, en mezo de belaj arbaroj nia verda familio por ĝui malmultekostan kaj agrablan refreŝigon dum sia libertempo kaj prepari sin por la grandaj taskoj, kiuj atendas nian movadon.

Detalan prospekton kaj aligilon petu tuj ĉe: K-do.Václ.Špŭr, řed.stát.spořitelny, Moskevská 453, DOKSY u Máchova Jezera.

Nunjare povas partopreni ankaŭ multaj gekamaradoj, kiuj intencis viziti nian II.TUTŜTATAN, kiu bedaŭrinde ne okazos.

ŜIRMADO KONTRAŬ ATOM-ARMILOJ

(speciale verkita por nia organo de MUDr.V.ŘEPKA majoro de la ĉeĥoslovaka armeo.)

La atomenergio reprezentas la plej grandan malkovraĵon de nia epoko, ĝi signifas novan epokon en la historio de la homaro kaj profunde influos la estontan evoluon.

En aŭgusto 1945 eksplodis la unuaj atombomboj super Hiroŝima kie pereis 70.000, kaj en Nagasaki 40.000 da homoj kaj proksimume la sama nombro estis vunditaj. De tiuj tempo kvazaŭ ruĝaj fadeno traĝas la atomenergio la internaciajn konferencojn depost la dua mondmilito. Atoma diplomatio fariĝis „Alfo kaj Omego“ de la usona politiko, penanta paroltrompi la propran popolojn pri danĝero de milito fare de komunistoj kaj aliflanke minacante, uzi potencon de la forto.

Fakte, la atomenergio estas terura armilo kaj tial necesas batali kontraŭ ĝia misuzo. Sed kontraŭ la atomarmiloj ekzistas ebleco sin ŝirmi kaj ne estas kaŭzo por paniko.

La usona atomdiplomatio kaj atoma sciologio celas timigi la mondon, influu la ĝis nun de ili sateligitajn ŝtatojn, premi ilin politike kaj ekonomie kaj peni akiri la regadon de la mondo.

En 1945 la atomatako kontraŭ neŝirmitaj japanaj lignourboj estis surprizo; ne estis anoncita alarmo, ne ekzistis kontraŭfajraj ŝirmaranĝoj kaj la loĝantaro ne troviĝis en rifuĝejoj. Ne estis kontraŭaviadilaj baterioj radare direktataj kaj ĵetaviadiloj. Tiam oni ne praktikis sangotransfuzon, ne estis antibiotiko, oni ne konis modernan kuracadon de brulvundoj, ne ekzistis modernaj kuraciloj kontraŭ diareo kaj multaj aliaj aferoj. Oni ne sciis kuraci la post sekvojn kaŭzitajn de radioaktiva iradiado. Dum normalaj cirkonstancoj tiutempe, la nombro de la viktimoj estus malaltiĝinta almenaŭ je unu dekonon.

La eksplodo de la atombombo similas al tiu de ordinara bombo nur estas ĝia efiko tre multobligita. Ĉe eksplodo super la tero estiĝas brileganita globo, la brilego instinktive devigas fermi la okulojn, kio signifas ilian ŝirmon.

Necesas tuj kuŝiĝi en fosajon, tranĉeon ktp. Kun la lumradiado disvastiĝas varmradiado, kiu haltiĝas per iu ajn tavolo da materialo. Helaj ŝtofoj pli ŝirmas la korpon, ĉar ili, pli forpuŝas varmon. La disvastiĝantan aerpremon el la loko de la eksplodo rezistas betonkonstruaĵoj kaj rifuĝejoj. Ekzemple rifuĝejo, havanta unumetran tertavolon, troviĝanta rekte en la loko de la eksplodo, rezistas. La forto de la aerprema ondo dependas de la tereno, malantaŭ teramasoj kreiĝa prem-ombroj. Fajroj estiĝas sekundare en la ruinoj de ne estingitaj hejtiloj, pro elektraj fuŝcirkvitoj kaj simile.

Krom la premondo kaj varmradiado efikas la radioaktiva radiado. Ĉe la eksplodo multo dependas de la meteorologiaj kondiĉoj kaj de la alteco de la eksplodo. Kobalto, troviĝanta en la ŝelo de la bombo, kreas nubon similan al fungo. Post eksplodo okaziĝinta en respektiva alteco ne postrestas sur la tero radioaktiveco. Neŝirmitaj homoj, trafitaj de la radiado, spertas svenon, vomadon, diarecon perdiĝon de blankaj kaj ruĝaj sangeroj, elfalon de haroj kaj steriliĝon. Akvo kaj nutraĵoj, ne ŝirmitaj kontraŭ la radioaktiva polvo, fariĝas post la eksplodo neuzeblaj. En la infektita terenspaco estas malpermesite manĝi, trinki kaj fumi.

En 1945 pli ol 80% viktimiĝis kaŭze de la eksplodo kaj nur eble 15% kaŭze de la radiado, kiu akompanis ĝin. Estas interese, ke kelkaj Japanoj, hazarde troviĝintaj dum la eksplodo rifuĝejo, transvivis la atakon eĉ en la ĉirkaŭaĵo de 300 metroj de la eksplod-centro. Hodiaŭ mi scias kiel batali kontraŭ la sekvoj de tiu ĉi radiado. La danĝero kaŭzita de la Gama-radioj, kaj neŭtronoj, sekve de la eksplodo, estas tre mallongtempa. Pli ol duono de la radiado estiĝas dum la unua sekundo de la eksplodo kaj 98% dum la unua minuto. Pro la granda varmego estiĝinta dum la eksplodo, ĉiuj materialoj de la atoma bombo laŭvorte elvaporigas. Tiuj ĉi gasoj, kiuj estas radioaktivaj leviĝas kun la ege varmigita aero alten, sekve de kio, se la atobombo ne eksplodas rekte sur la tero aŭ en akvo, ne estas la ĉirkaŭaĵo de la eksplodo ŝarĝita de radioaktiva infekto. La atombombo estas dutranĉa armilo, ĉar la gasoj malvarmiĝopovas en malproksimaj lokoj reveni al la tero kaj ĝin infekti.

La savantaro estas ekipita per ŝirmvestaĵoj kaj dozimetraj por povi konstati ĉu la tereno estas infektita, ili havas maskojn kun arsina intertavolo kaj altajn piedvestojn. Post la laboro necesas radikala duŝado. Post paso de tempo la radioaktiva infekto rapide malpliigas.

La klopodo de la pactendaro kaj Sovjet-Unio, kiu savis la popolojn de Eŭropo antaŭ la faŝista elmurdado, sukcesos eluzi la atomenergion por la prospero de la homaro. Ni ĉiuj aktive devas batali por la paco kaj elkonstruo de socialismo. La fortoj, kiuj malhepas niajn klopodojn, devas esti el la mondo forbalitaj!

La batalo kontraŭ la atomarmiloj samtempe estas batalo por paca eluzo de la atomenergio kaj por la venko de la pactendaro kaj socialismo.

Esperantigis d-ro.J.ČERNÝ

Nia redakcio vokas ĉiujn fakulojn kaj speciale la japanajn, inĝenieron Bostwick, J.Currie kaj aliajn, kiuj persone spertis dum la eksplodoj en Hiroŝima kaj Nagasaki, al publika diskuto pri tiu ĉi grava problemo. Ĉiun kontribuon certe ni interpretos al la aŭtoro de ĉi supra artikolo kaj laŭ ebleco ni ĝin ankaŭ publikigos ĉi tie kaj en aliaj kun nia organo fratigitaj eldonaĵoj. Ĉiujn kontribuojn sendu: al k-do.Rud.BURDA, Palackého n.6, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio.

GRAVA HISTORIA DOKUMENTO

Estas la ja kolekto de „LA PACDEFENDANTO“ el 1955. En ĝi respeguligas vere historie gravaj okazintaĵoj rilate la renaskiĝon de nia movado en la Popoldemokratioj kaj Sovjet-Unio. La volumaro ampleksa 104 paĝojn (kompleta jarkolekto). Ricevebla kontraŭ paĝo de 1.-Kĉ aŭ 16 inter naciaj resp.kuponoj ĉe nia redakcio. Ni ankaŭ akceptas rekompence samvaloran progreseman literaturon el eksterlando.

Mendu tuj !

ĈU NI KAPABLOS KUNMARŜADI

La Esperanto-movado pli kaj pli disvastiĝas en Sovjeta Armenio, precipe en ĝia ĉefurbo Erevan. Dank` al la fervora agado de kelkaj malnovaj esp-istoj, la intereso pri nia lingvo inter instruistoj, studentoj kaj aliaj intelektuloj estas tre granda. En la registara kaj partia altaj instancoj oni tre favore rilatas nian agadon kaj enterprenojn.

La Erevana centra radiostacio kelkfoje disaŭdigis informojn pri Esperanto, ĝia signifo por la tutmonda pacmovado kaj kultura kontakto inter la popoloj, pri la funkciantaj kursoj de Esperanto en Erevano kaj pri la kunvenoj de erevanaj esperantistoj.

En la ĉiutaga ruslingva gazeto „KOMUNIST“, organo de la Centra kaj erevana komitatoj de la Armenia Komunista Partio, la 21an de marto aperis favora artikolo pri Esperanto, ĝia grava rolo por interligo de diversaj popoloj k.ĝia signifo en kulturaj interrilatoj.

La 8.de marto en la armenlingva organo de la Armenia Asocio de Sovjetaj Verkistoj „GRAKAN TERT“ (Literatura gazeto) aperis artikolo sub titolo: „Kultura interligo pere de Esperanto“, ĝi informis ke erevanaj esp-istoj kun granda danko ricevis de la Asocio de Esperantistoj en Pollando la faman verkon de A.Mickiewicz „SINJORO TADEO“ kaj la monografion de M.Jastrum pri Ad. Mickiewicz. La aŭtoro de ĉi artikolo donis samtempe ankaŭ informojn pri esp-novaĵoj.

La 15.de aprilo en la Erevana Kulturdomo de la Instruista Sindikato, sub aŭspicio de la Centra Sindikata Komitato okaziĝis solena kunveno dediĉita al la 40.datreveno de la morto de nia majstro L.L.Zamenhof. La kunvenon malfermis reprezentanto de la Centra Sindikata Komitato, estrarano de la C.K.k-do.Suron OHANJAN, kiu per kelkaj vortoj klarigis al la ĉeestantoj la celon de la kunveno, pri la internacia lingvo Esperanto kaj ĝia vigliĝo en Sovjetio.

K-do. Simon MKRTIĈJAN prelegis pri la vivo de L.L.Zamenhof kaj lia genia verko Esperanto.

Tre interesa paroladon faris k-do.prof.Gurgen SEVAK pri Esperanto kaj la Esp-movado en Sovjet Unio kaj eksterlando. Li per konvikiĝaj faktoj sciance klarigis al la ĉeestantaro, ke la tiel nomata „arte farita“ lingvo Esperanto estas viva lingvo, ĝin parolas milionoj da homoj tutmonde kaj estas traduktiaj en Esperanton ĉiuj ĉefverkoj de la tutmonda literaturo. La ĉeestantoj tre varme akceptis la prelegon de k-do.Sevak kaj per aplaŭdo esprimis sian kontentecon. Estis metitaj kelkaj demandoj el flanko de la aŭskultantoj, kiujn la preleginto respondis.

La kunveno decidis malfermi kurson de Esperanto. Eskribiĝis 20 geinstruistoj. La registrado daŭris tutan semajnon kaj el ĝi rezultis aliĝo de 50 personoj.

La armenlingva gazeto „SOVETAKAN DPROC“ (Sovjeta lernejo), organo de la Ministerio per Klerigo kaj Centra komitato de la Instruista Sindikato en Sovjet-Armenio la 21.de aprilo publikigis interesan artikolon de redakcia kunlaboranto, k-do.A.MNACAKANJAN, la aŭtoro donas koncizajn informojn pri Esperanto kaj pri la vivo kaj agado de nia majstro L.L.Zamenhof.

La 22. de aprilo ĉe la kulturdomo de instruistoj en Erevan malformiĝis dimanĉaj kursoj de Esperanto. Partoprenas 22 lernantoj. La kurson gvidas d-ro.prof.Sevak .

Antaŭ la komenco de la leciono k-do.S.Mkrtiĉjan informis la kursanojn pri la organo de ĉeĥoslov. esp-pacdefendantoj „LA PACDEFENDANTO“, li tralegis esperante kaj tradukis armenon la publikitan en marta n-o. de la organo, leteron de nia amata granda poeto Avetik ISAHAKJAN al la prez.de „MEM“, k-do.Rud.Burda.

Pere de Armena Societo por kultura interligo kun eksterlando erevanaj esp-istoj danke ricevis el Polio po 3 ekz-oj la verkon „Sinjoro Tadeo“ de A.Mickiewicz k.la Monografion pri Mickiewicz de M.Jastrum.

Moskva gazeto „MOSKEVSKIJ KOMSOMOLEC“ (Moskva Kom. Junularo) de 11.aprilo aperigis artikolon pri la 6.Festivalo de tutmonda junularo kaj studentoj kiu okazos en Moskvo dum 1957; la gazeto proponas disvatigi Esperanton inter sovjetaj gejunuloj por ke ili estu pretaj kaj organizitaj por la renkontiĝo kun eksterlandaj esperantistaj gejunuloj dum la festivalo en 1957.

Simon MKRTIĈJAN
MEM-per-to por la Transkaŭzaj Sovjet.Respublikoj

KIU POVAS HELPI ?

K-do.Josef HOŘEJŠÍ,D.Z. ZVIL. Čechova ul., PLZEŇ, Ĉeĥoslov.bezonas medicinon kontraŭ alta sangpremo „SERPASIL“. Ĉiuj elspezojn li volonte rekompencos per iu ajn folkloraj objektoj laŭ via deziro.

NI BONVENIGAS NOVAN RONDETON

Ĉe la sindikata klubo de la vitrofabriko „MORAVIA“ fondiĝis Esp-rondeto. Ĝi estas favorata de la klubestraro eĉ de la uzindirektoro. La rondeto celas kontribui al la paco. Interesuloj bonvolu skribi al k-do.Miroslav LUNGA, SKORONICE, Ĉeĥoslovakio.

ESPERANTO-SEMINARIO

La uzina klubo de la grandaj prefabrikoj de V.M.Molotov en TŘINEC (Moravio) aranĝos Esperanto-Seminario de 4-10.junio. Kiu aliĝos ĝis la 15.majo, ricevos 50% fervojrabaton. Tradicia pilgrimo al la monto Ĉantorio kaj renkontiĝo kun polaj esp-istoj okazos ĉe la finiĝo, la 10.de majo (*junio*).

Aliĝu ĉe: Z.K.ROH železáren V.M.Molotova, n.p.TŘINEC, ESPERANTO-Kroužek.

NI GRATULAS

al gek-doj.Josef EŠPANDR kaj A.DVOŘÁKOVÁ okaze de ilia edziĝfestoj de 7a aprilo en Javornice.

NI FUNEBRAS.

Pasintan monaton mortis nia kara k-do.aktiva kaj entuziasma esp-pacdefendanto, Karel PŘEČEK el Dolní Bludovice ĉ.551.

La 12.de aprilo mortis en aĝo 82 jaroj entuziasma esp-isto kaj pacdefendanto, lernejdirektoro Antonín PAUL el Domažlice, laste loĝinta en HORŠOVSKÝ TÝN.

KORESPONDI DEZIRAS :

K-do.Valentin OVĈAROV, U. Šterii Vodeničarov 17, BOURGAS, Bulgario, per il.p.k.Interŝ.p.m.kaj sportrevojn

K-dino.M.A.Aleksandroba GEORGIEVA, Str.Kiril k.Metodi 164, SOFIA, Bulg.per let.kaj p.k.Interŝ.il.gaz.fot.

K-dino.Věra BARTOŇOVÁ, Sv.Čecha ĉp.1271, TURNOV-II, Ĉeĥoslov.,kun ĉ.l.pri ĉ.temoj, kaj interŝ.il.p.k.

K-do.O.MAREK, instruisto, ŽAMBERK 797, Ĉeĥoslov., kun natursciencistoj por interŝ.skarabojn el ĉiuj mondpartoj.

K-dino.Svatava FAGOŠOVÁ, (16jara) akuŝistino, Přemyslovců ĉ.13, OSTRAVA-III, Ĉeĥoslov., kun ĉiuj landoj.

K-dino.Božena KNAPCOVÁ, oficistino, (20jara) Ludgeřovice-Vrablovec ĉ.418, okr.Hlučín, Ĉeĥoslov., kun ĉ.landoj.

K-dino.R.MAREŠOVÁ, (instruistino) ŽAMBERK ĉ.642, Ĉeĥoslov., kun ĉ.land.pri muziko kaj per il.p.k.

K-dino.J.BELTMAN-HULSHOF, Kruisstr.40 A.ZUTPHEN,Nederlando kun ĉ.land.

K-do.Herman LIEBELT, Magdelstr.91,JENA, Germanio-D.D.R.pri ĉ.temoj kun ĉiuj landoj.

K-dino.Violeta M.PANÖFVA, Str.Filip Totju 28, SOFIA-10, Bulgario, (18jara) per il.p.k.kaj *lxx* pri sporto.

K-do.Stanislav ŠMÍD, Velešlavínova 32 PLZEŇ, Ĉeĥoslov.,kun ĉ.landoj per il.p.k.kaj pm.

K-do.Vratislav KUČERA, pošt.schr.61, PLZEŇ, Ĉeĥoslov.,kun ĉ.landoj kaj interŝanĝi alumetvignetojn p.k.kaj pm.

K-dino.Galja VASILJEVA, USSR, MOSKVA-VI, ulica Oktjabrskaja Pole d.35/7 kun ĉiuj landoj pri divers.temoj.

K-do.K.ZWIERS, Middenstrast.37, SLIED-RECHT, Nederlando, interŝ.po 100 pm. (ŝtampitaj aŭ neŝtamp.) kun ĉ.landoj

K-do.Jo.Van LEEUWEN, Watermolenstr.15. WESTZAAN, Nederlando, kun ĉ.land.

K-do.P.M.KIRJUŠIN, Krasnaja 16, kv 20, MINSK-5, Sovjet-Unio, serioze, precipe ku scienculoj pri filozofio, logiko kaj psikologio. Interŝanĝas esp-an kaj nacilingvan literaturon.

K-dino.Helena DOLGIĤ, A.K.SOVASTIANOV, Glavni Poĉtamt, poŝtkesto No.466, MOSKVA, Sovjet-Unio, kun instruistoj de geografio – fremdlingvoj, bibliografistoj, por interŝanĝi spertojn reciproke.

* * *

Multajn raportojn necesis prokrasti por venonta n-o.pro manko de papero kaj mono. La ŝuldantaj gek-doj. nepre egaligu siajn jarabonojn !!

Eldonis: OKRESNÍ VKÝBOR OBRÁNCŮ MÍRU – Odbor esperantistů – MIKULOV.

Redaktis_ K-do.Rudolf BURDA, Palackého nám.ĉ.6, P L Z E Ň , Ĉeĥoslovakio
